# *Altrangaj funkciuloj usonaj itineras tra Kolombio kaj aliaj sudamerikaj landoj.*



Va?ingtono, apr 12 (RHK) La? raportas la retejo de Telesur, la Blanka Domo sciigis per komuniko en sia oficiala retejo, ke la ?efa direktoro por la Okcidenta Hemisfero, Juan González, kaj la interna vicsekretariino de la ?tata departemento, Julie Chung plenumas oficialan viziton en Kolombio.

La komuniko anka? sciigas ke tiu ?i vizito inkluzivos aliajn landojn kiel  Argentino kaj Urugvajo.

En Bogoto ili pritraktos la ekonomian rekuperi?on, la sekurecon kaj kamparan evoluon, la krizon de migrantoj venezuelaj kaj la regionan gvidrolon de Kolombio pri aferoj de klimato, la? sciigis la oficiala noto.

La usona registaro deklaris ke en Argentino kaj Urugvajo, ili "pritraktos la ?efajn regionajn prioritatojn, inkluzive la traktadon pri la defioj de la klimata krizo, la homajn rajtojn kaj la sekurecon en nia hemisfero kaj tutmonde".

Fonto: Telesur

---

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/internacionales/253742-altrangaj-funkciuloj-usonaj-itineras-tra-kolombio-kaj-aliaj-sudamerikaj-landoj

**Radio Habana Cuba**